EN PER ANC 47

n° 179 Februaro 1994

# ESPERANTO NORMANDA BULTENO

unuiĝo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 45 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

## BONDEZIROJ

Jen nia unua bulteno de jaro 1994.Estraro de ESPERANTO-NORMANDIE (Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj) deziras al ĉiuj siaj membroj kaj legantoj :

*FELIĈAN NOVAN JARON !!!...*

Ni scias ke situacio de multaj familioj estas zorgoplena. Sed dank'al niaj internaciaj rilatoj, ni estas informataj ke en multaj landoj , vivkondiĉoj estas multe pli malbonaj kaj eĉ danĝeraj.

Nia ĉefa bondeziro por 1994 estu do Paco en tuta mondo kaj ekonomia harmoniiĝo por ke ĉiuj povu labori kaj vivi feliĉe !!!

*****************************************************************

*ESPERANTO EN NORMANDIO*

*Ni invitas vin partopreni ĜENERALAN KUNVENON de NORMANDAJ ESPERANTISTOJ :*

*DIMANĈON 10an de APRILO 1994 je la 14a horo .*
*en ROUEN , SALLE de la HALLE AUX TOILES*
*PLACE de la BASSE VIEILLE TOUR .*

*Por esti efikaj,ni devas reorganizi nian unuiĝon kaj renovigi ties estraron. Novaj ideoj estas nepre necesaj por vigligi nian asocion .*

*Rezervigu tiun daton prioritate por Esperanto !Esperantistoj kaj simpatiantoj, venu multnombraj por kuraĝigi aktivulojn.*
*Ankaŭ, informu nunan prezidanton pri via kandidateco al nova estraro!*

## *ASSEMBLEES GENERALES DE ESPERANTO-NORMANDIE*

### *1°Assemblée Générale de l'Union des Espérantistes de Normandie*

Cette Assemblée Générale statutaire se tiendra le Dimanche 10 Avril 1994 à 14 h salle n° 10, Halle aux Toiles, Place de la Basse Vieille Tour, Rouen (Rive droite). Tous les espérantistes de Normandie doivent y participer. Nous comptons sur votre présence.Réservez cette date dès maintenant sur votre agenda.

Au programme: Rapport Moral, Rapport financier, projets d'actions, renouvellement entier du Comité Directeur, Résolutions,etc...

### *2° Fédération Normande de l'Union Française pour l'Espéranto*

Cette réunion fera suite à l'assemblée Générale de l'Union (UNE) et sera en principe réservée aux adhérents d'UFE. Elle se tiendra de 16 h 15 à 17 h15.
Au programme : relations avec l'Union normande, Renouvellement du bureau,Informations sur les activités d'UFE

### *3° Groupe Esperanto Région Rouennaise*

Cette réunion se tiendra à partir de 17 h15 ; elle sera réservée aux anciens adhérents du GEER.
Discussion:Ce groupe est en sommeil depuis plusieurs années; faut-il le continuer? Y aura-t-il des volontaires pour en assumer la direction? Sinon, il faudra décider de sa dissolution !
( Actuellement les activités espérantistes dans l'agglomération rouennaise sont faites sous l'égide de la section Rouen/ Quevilly d'Esperanto-Normandie )

****************************************************************

### KANDIDATECO por ESTRARO de UNE :

Ĉar de pluraj jaroj, ni ne povis organizi ĝeneralan kunvenon, ni devas laŭstatute renovigi entute la estraron de nia asocio.
Estas dezirinde ke ĉiuj grupoj estu reprezentataj.
Eks-membroj povas rekandidatiĝi sed dezirindaj estas novuloj.
Se vi opinias ke Esperanto estas bona ideo kaj se vi bonvolas helpi nin , skribu al nia prezidanto ke vi akceptas fariĝi estrar-ano.
Adreso de UNE Prezidanto:

Pierre POTTIER, 21, Allée des Roitelets, Quartier Réfigny
76190 YVETOT

# POUR l'ESPERANTO TOUS à ROUEN

## LE DIMANCHE 10 AVRIL 1994 !!!

PREMIER RENDEZ VOUS: à 10 h15 devant l'entrée de la Halle aux Toiles, Place de la Basse Vieille Tour.
Il est facile de garer sa voiture le dimanche matin sur les quais de la rive droite ou dans le parking payant de la Place de la Haute Vieille Tour ( de l'autre côté de la Halle aux Toiles)
De 10 h 30 à 12 h 30 : promenade pédestre dans les vieux quartiers de Rouen .

DEUXIEME RENDEZ VOUS à 12 h30: Restaurant libre-service FLUNCH, 60 rue des Carmes. Chacun mangera selon son appétit ... et son porte-monnaie!!!

TROISIEME RENDEZ VOUS à 14 h. Halle aux Toiles, Place de la Basse Vieille Tour, dans une salle au 2° étage: Assemblées Générales.
Venu kuñ viaj ideoj, viaj sugestoj kaj via entuziasmo !

Les expériences malheureuses passées nous ont empêchés d'organiser un programme du samedi soir.
Ceux qui viendront de Sud-Normandie et qui souhaitent réserver une chambre d'hôtel peuvent contacter Pierre Quillaud.

****************************************************************************

## VIVO DE NIAJ GRUPOJ

**EVREUX :** *Malnovaj membroj de nia unuiĝo eble memoras pri sindonema kaj tiama tre aktiva samideanino Paulette MONTAGNE . Oni informis nin ke ŝi mortis la 14 an de decembro.Ŝi restis fidela al nia asocio. Ni kondolencas familianojn kaj esperantistojn en Evreux.*

**GRAND-QUEVILLY /ROUEN** *: La ĉiusemajnaj kunvenoj okazas regule . Dank'al klopodoj de P.KIJO, aperis duonpaga interesa artikolo en "PARIS-NORMANDIE" (Eldono de Rouen). Sekve de tiu artikolo, multaj personoj telefonis petante klarigojn kaj informojn pri kursoj.*

**YVETOT** *: La grupo akceptis Samideanon Žioko IVANOVIĆ el Serbio kiu verkis pasintjare libron : Antologio de la serba parola literaturo : mezepoka prozo, lirikaj kaj epopeaj poemoj. Li prezentis sian libron kaj ankaù okazis tre interesa diskuto pri terura situacio en eks-Jogoslavio.*
*La 15an de Decembro, okazis la ĝenerala kunveno de la grupo ; raporto sufiĉe kompleta kun grava titolo aperis en PARIS-NORMANDIE*
*La 26an de Januaro, libera radio " FRATECO " intervjuis Pierre Pottier kaj Pierre Quillaud dum elsendo kiu daùris tri kvaronojn. Tiu intervjuo estis interesa sed " Radio Frateco" estas aùdebla nur en regiono cirkaù Yvetot.*

**LE HAVRE** *: Sro IVANOVIĆ prelegis ankaù pri serba literaturo la 18an de decembro okaze de monata kunveno.*

**LISIEUX** *: Ĉiam aktivaj estas niaj tieaj geamikoj. Sed mankas gejunuloj*

**FECAMP, DOMFRONT,CAEN** *, ...kaj aliaj : oni atendas viajn raportojn !*

# LA ASOCIOJ POR HELPO AL KRIMVIKTIMOJ

Antaŭ pli ol 10 jaroj, oni ekkonsciis, ke la krimviktimoj estas plej ofte forlasitaj al sia cagreno kaj timo. Neniu zorgas pri ili. Tamen la viktimoj bezonas helpon kaj komprenemon. Ŝokitaj de la krimo, ili ofte timas kaj ne scias, de kiu peti helpon kaj konsilon. Rapide policanoj, prokuroroj, juĝistoj, advokatoj komprenis la problemon kaj kuraĝigis la kreadon de asocioj por helpo al la krimviktimoj.

Nuntempe la asocioj por helpo al la krimviktimoj ekzistas en la tuta lando. Malmultaj estas la departementoj kiuj ne havas la sian.

En Parizo, tutlanda asocio INAVEM (Institut National d'Aide aux Victimes Et de Médiation) kunligas la diversajn asociojn.

1°) Strukturoj de la asocioj

Ni ĉiuj scias ke asocio ne prosperas per nenio; ĝi bezonas monrimedojn. Ili kompreneble enkasigas la kotizojn de la membroj sed tio ne sufiĉas por havi harmonian funkciadon de la asocioj.

Tiuj-ĉi do petas subvencion de ŝtato kaj de publikaj instancoj (Ministro pri juĝistaj aferoj, provinca konsilantaro, komunumoj, ktp...).

La personaro de la asocioj estas tre varia.

La estraroj estas ankaŭ variaj. En Rouen, la prezidanto estas tradicie prokuroro, kvankam tio ne estas skribita en la statuto. La estraranoj venas el diversaj medioj. Sed la estraranoj havas ĉiuj sian propran profesion; ili do ne rekte laboras en la sidejo kaj ne akceptas la viktimojn. Tion faras salajrigitaj oficistoj kaj bonvoluloj; ĉiuj havas bonegan scion pri la juĝistaj aferoj kaj akceptas la viktimojn kiuj petas helpon de la asocio.

Kelkaj asocioj havas sian sidejon en la juĝejo mem, kiel ekzemple en Rouen; kelkaj loĝas en komunuma domo aŭ en luita hejmo.

2°) Kiel funkcias la asocioj?

Kutime, oni akceptas la krimviktimojn ĉiutage, kelkfoje nur dum tri tagoj en la semajno. Tio dependas de la asocio. La vizitantoj estas tre diversaj.

Plej ofte, venas veraj viktimoj, t. e. homoj kiuj suferis korpe, spirite aŭ mone de krimuloj. Plej ofte la krimo estas trafikakcidento, ŝtelado, trompaĵo, batofrapo,ktp...Tiuj viktimoj estas la homoj por kiuj estis kreitaj la asocioj. Oni do povus akcepti nur ilin kaj forpeli la aliajn. Sed oni konstatas ke la homoj ne scias diferencigi la verajn krimojn de la aliaj malagrablaĵoj. Oni do akceptas ĉiujn kiuj havas malagrablaĵon pri la loĝejo, la laboro, la heredaĵo, aŭ la edzo,ktp...

Kiam venas vizitanto, oni unue aŭskultas lin. Tio estas treege grava, car tro ofte, ĝis tiam,neniu havis la tempon vere aŭskulti lin. En policejo, juĝejo, oni rapide verkas raporton. La viktimo havas impreson ke lia sorto interesas neniun.

Fakte la viktimo estas suferanto. La krimo profunde vundis lian animon, kelkfoje lian korpon. Viktimo kiu restis en malsanulejo dum semajnoj post batofrapo vere suferas kaj timas. Li ne scias al kiu iri por ricevi helpon aŭ almenaŭ informon.

Oni do aŭskultas pacience, kiel amiko kiu akceptas amikon. Kiam la viktimo elverŝis sian koron, oni demandas lin pri la necesaj detaloj kaj klarigas al li kiamaniere lia afero antaŭeniros, indikante ankaŭ kiaj estas la manieroj, por ke li ricevu monkompenson.

Kompreneble, oni precizigas ke la asocio helpos en la diversaj sinsekvaj periodoj de la proceduro. Tio signifas ke la asocio ne forgesos la viktimon post lia vizito sed male daŭre helpos lin.

Kaj fakte, tion faras la asocio !

Kiam la afero ne estas striktosence punafero sed privata civila proceduro, la asocio ne povas anstataŭigi la advokaton, kiu plej ofte estas deviga. Oni do konsilas la vizitanton, ke li konsultu advokaton. Se li ne estas riĉa, oni informas lin pri la ebleco havi konsulton je reduktita prezo aŭ eĉ ricevi senpagan juran helpon, se li plenumas la kondiĉojn por ĝin havi.

Sed kiam la vizitanto estas vera krimviktimo, la asocio sekvas la proceduron; ĝi komencas sian laboron ĉe la prokurorejo kie ĝi informiĝas pri la decido de la prokuroro. Poste ĝi informiĝas pri la dato de la aŭdienco kaj klarigas al la viktimo kiamaniere li povas peti monkompenson. Kiam la monpeto estas grava aŭ komplika, la asocio konsilas al la viktimo elekti advokaton por prezenti kompletan kaj taŭgan dosieron.

Post la aŭdienco, la asocio informiĝas pri eventuala apelacio kaj denove klopodas helpi la viktimon por ke li ricevu la monkompenson kiun devas pagi la kondamnito. Tio ne estas facila tasko, ĉar plejofte, la krimulo estas sen profesio, sen monrimedoj kaj tute ne emas pagi. La asocio klopodas konvinki la kondamniton, ke li devas pagi.

Se tiu-ĉi ne pagas libervole, la viktimo povas peti la helpon de jura persekutisto (Huissier de Justice) . Sed tio povos sukcesi, nur se la kondamnito estas monhavanta, kio malofte okazas.

La situacio de la kompatinda krimviktimo fakte tuŝis la koron de la ŝtato. Antaŭ kelkaj jaroj, oni starigis "CIVI" (Commission d'Indemnisation des Victimes d'Infraction) por doni ŝtatan monkompenson al la viktimo kiu suferis korpajn damaĝojn (ekz. post batofrapo) kaj ne sukcesas pagigi la kondamniton. La asocio ankaŭ helpas viktimon fari sian petdemandon.

Jen do la ĉefaj trajtoj de la agado de la asocioj por helpo al krimviktimoj. Sendube, tiaj asocioj estas necesaj en nia socio kiu tro ofte ne sufiĉe atentas la suferantojn.

Nuntempe, tiaj asocioj, kiuj agas senbrue kaj senpage, ekzistas en ĉiuj partoj de nia lando. *Espereble, vi neniam bezonu ilian helpon !*

A.B.
(Grupo de Rouen)

************************

**MARKOS (EDITIONS BILINGUES)** a déposé 4 titres :LePetit Roi / La Regeto,
Trans Sahel / Trans Sahelon, 1984 /2000, Imo (Livres Français /Esperanto) chez:Librairie Van Moe et Librairie l'Armitiere à Rouen ; La Galerne au Havre

# NORMANDOJ PRAKTIKU NIAN LINGUON

# en LANGUEDOK - RUSILJONO dum 1994

$$$$$$$$$$$$$$$$$$

## 20a Internacia Semajno de Esperanto en Sète (Le Lazaret)

Pro niaj pasintjaraj sukcesoj, ni organizos venontsomere internacian semajnon kiu okazos de la 3a gis la 10a de septembro ĉe mediteranea marbordo, en havenurbo Sète , 30 km okcidente de Montpellier, en bela parko apud la maro.

Ni proponas al vi lerni aù perfektigi vian scipovon pri Esperanto . Ni havos diversnivelajn kursojn gvidatajn de eminentaj geintruistoj inter kiuj S-ro Babin kaj Sro Gubbeins.

Kiel ĉiujare, vi trovos vere internacian etoson. Ankaù, banado, piedpromenadoj, ekskursoj, vizitoj, kantado, interesaj vesperkunvenoj, kaj bonaj manĝoj gojigos vin. Tre modesta restadkosto; eblas tendumi proksime. Aliĝoj kaj informoj: Centre Culturel Esperanto de Montpellier, 5 rue du Docteur Roux 34000 Montpellier.

## 86a Nacia Kongreso de France-Esperanto (UFE)

Ĝi okazos en Agde apud Mediteranea Maro , je Ĉielirado, (11a gis 15a de Majo) .Agde situas inter Beziers kaj Montpellier . Diversa programo atendas vin : ripozo, turismo, vingustumado, kvarhora navigado sur la Kanalo de la Sudo kaj la lago de Thau, ekskursoj al la urbo de Molière (Pézenas), al la lando de Kataroj, al la famega malnova urbocentro Carcassonne kaj al Sète kie muzika spektaklo omaĝos al la poeto de amikeco (Georges Brassens) . En la restadejo, loĝ-kaj-manĝ-kostoj estas modestaj.
Aliĝoj kaj informoj : Charles GERARD-VOINCON 4 Rue du Docteur Rives 66000 Perpignan

Ĵus antaù tiu kongreso, disvolviĝos en la sama restadejo, la kutima lingva staĝo organizita de la Béziers-a Espéranto rondo, ĉi-jare de la 7a ĝis la 11a de Majo . Tiel, eblos pasigi tutan semajnon en esperantista etoso por eklerni rapide aù pli funde scipovi la Internacian Lingvon. Interesatoj bonvolu sin turni al : Suzanne Authier, 9 rue Georges Picot, 34500 Beziers

*******************************************************************

# PRAKTIKU ANKAU EN KULTURA DOMO

# KASTELO GRESILLON 49150 BAUGE

Kiel atingi Grésillon?
<u>Vagonare</u> inter Le Mans kaj Saumur la buso (SNCF) haltas en Baugé.Petu la horaron.Anoncu la horon de via alveno;iu atendos vin ce la bushaltejo.
<u>Aùtomobile</u>: Baugé situas ce la kruciĝo de 2 gravaj vojoj: Angers-Blois kaj Le Mans-Saumur. Grésillon situas je 2 km de Baugé.

TARIFOJ: Bonvolu telefoni al 41 89 10 34 por scii la restadkondiĉojn.

KULTURAJ ARANĜOJ 1994:

Internacia amika renkonto de 22a de junio gis 9a de julio
Nedeviga programo: kursoj, gvidata konversacio

Kursoj trinivelaj :gvidos Przmek kaj eble Eva Bondar, gvidata konversacio
De dimanĉe 10a de Julio ĝis sabate 23a de Julio

Lernu, praktiku kaj perfektiĝu. Gvidos Fernand Boyet (Gramatiko dum unua semajno) ; Georges Lagrange (Tradukado dum 2a semajno)
De 24a de Julio gis 6a de Aùgusto

Kursoj trinivelaj
De 7a de Aùgusto gis 20a de Aùgusto

Por la instruantoj : pedagogia helpo
de 21a de Aùgusto ĝis 3a de Septembro

Dum ĉiuj stagoj, prelegoj,komunaj promenadoj, distraj vesperoj, ekskursoj, librobindado, korbofarado ktp...

Estas preferinde partopreni staĝon de komenco gis fino.

Petu aligilon al : ESPERANTO -DOMO P. Babin
19 Impasse Mabileau
44100 Nantes

**********************************************************************

## 45a KONGRESO de SAT-AMIKARO

Ni jam informis vin en antaùa bulteno ke ĝi okazos en Grésillon de la 2a gis 5a de Aprilo
Vi povos loĝi , ĉu en la kastelo mem, ĉu en Hotelo Marmotte en La Flèche.
Duontagaj ekskursoj okazos sabate posttagmeze :
unua grupo: Piede al Baugé tra la parko de Grésillon (Apotekejo, Kastel-muzeo,Malnovaj kvartaloj)
Dua grupo : Aùtomobile, ĉirkaùaĵoj de Baugé, fosilioj, dolmeno,romana pregejo...
Tuttaga ekskurso okazos mardon 5a de aprilo . Aùtobuse, trogloditaj domoj, distilejo Cointreau, kastel-muzeo de Angers kie estas famkonata tapiserio "Apokalipso"kaj muzeo "Lurçat"

**********************************************************************

## NUN LA KASISTO

Jen la lasta listo de kotizintoj por jaro 1993 :
Gesinjoroj: Angenault, Bataille, Benoit, Bessière, Caron, Charron,Couture, Defrance, Dubois, Feret, Gibeaux, Guéroult, Guerre, Haulard, Helbert, Jouvin, Lebrun, Legros, Le Héricey, Le Mazurier, Loisel, Magerel, Martin, Maurice, Mendès, Michaud, Michel, Millet, Nicolas, Pottier, Quillaud, Quillet, Rauch, Robiolle, Roblin, Saunier, Tailpied.

Se via nomo ne estas en tiu listo, tio signifas ke ni atendas vian ĉekon; bonvolu samtempe pagi vian 1994-kotizon.

Se vi pagos pere de via grupa kasisto, vi profitos redukton (30 f anstataù 45 f)

Petro KIJO

# ALIĜOJ AL ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ

Dans notre précédent bulletin, nous vous indiquions les conditions d'abonnements pour diverses revues espérantistes, mais le meilleur moyen pour soutenir notre action est l'adhésion aux associations nationales et mondiales.
La liste ci-dessous n'est pas complète. Que les responsables d'autres associations nous fassent connaître leurs conditions.Nous les ferons paraître dans un prochain bulletin.

**NATURAMIKOJ** kun bulteno "La Migranto"
Sendu 40F al la perantino: Aurore Casanova, 118 avenue La Ferrière
94000 Créteil
CCP Esperanto-Migranto 2076 05 N Paris
La peranto por Normandio estas : Paul Mary , 348 rue Pablo Néruda
76610 Le Havre

Groupe d' Action pour l'Esperanto 123 rue de Royan 16710 Saint Yrieix
Kotizo 100 f Sendu ĉekon al ĉi-supra adreso
Tiu asocio ne eldonas bultenon sed vigle agas por propagandi nian lingvon;ĝi estas tre subteninda

**SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA** kun Sennaciulo,Sennacieca Revuo kaj Adresaro (Jarlibro)
Abonkotizo : 280 f (215 f por emeritoj, 140 f por junuloj kaj senlaboruloj)
Sendu ĉekon al Pierre Quillaud CCP 1906 23 C Rouen

**SAT-AMIKARO** kun bulteno
Abonkotizo: 160 f ( 80 f por junuloj)
Sendu ĉekon al André Sadier , 22 Av P.V.Couturier Bât. N.D. 93000 Bobigny
CCP 7 658 05 Paris

**JEFO kaj TEJO (Jeunesse Espérantiste)** kun "JEFO-INFORMAS",KONCIZE",
"KONTAKTO" "TEJO-TUTMONDE"
Pro multaj kotizkategorioj, petu aliĝilon ( Bulletin d'adhésion) kun prezoj ĉe JEFO , 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris

**UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO** kun Franca Esperantisto
**UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO** kun Esperanto kaj Jarlibro
Pro multaj kotizkategorioj petu aliĝilon ĉe:
UFE 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris

**FEDERATION ESPERANTISTE DU TRAVAIL** kun Le Travailleur Espérantiste
Abonkotizo:120 f Fédération Espérantiste du Travail, 115 rue Béranger
92320 Chatillon, CCP 902 52 F Paris

*****************************************************************************

LA REDAKTORO PLENDAS :
- ĉar li ricevis nur unu artikolon por tiu bulteno
- ĉar grupestroj kaj kursgvidantoj ne sendis adresojn de novaj lernantoj por ke ili ricevu nian bultenon
- ĉar ili ne sendis liston de forigotoj kiuj ne plu praktikas

Dankon pro legado de tiu bulteno !

Petro KIJO

# FRANCE-ESPERANTO KARAVANO :

N.B. Vojaĝo trans la eùropa plus azia kontinentoj estas jam baze sufiĉe kosta. Pro tio, ni suspektas, ke antaù ol aliĝi vi deziras havi ideon pri la kostoj. Pro tio ni tuj donas prognozon, sufiĉe precizan, kies nura necerteco ligiĝas al la valoro de la usona dolaro. La prezoj de la vojaĝo estas pagitaj en franca mono, do estas definitivaj, nur la ena parto pri gastigo, manĝoj kaj ekskursoj riskas etajn modifojn. La referenca dolarkurzo estas 6 FRF. Por interesi pimulton, ni memvole limigis al 17-taga maksimumo la proponojn.

**UNUA PROPONO : (12-taga)**

Ekiro Merkrede 20-an de Julio (12h30 ĉe PARIS ROISSY). Alveno en Seùlo Jaùde 17h30.

Reveno Dimanĉe 31-an de Julio (en Roissy 19 h 10)

Tutan semajnon en la SHERATON WALKER HILL kie okazas la ĉefaj aranĝoj de la universala kongreso.

En la prezo entenatas

rekta flugo per AIR KOREAN (Parizo/Seulo/Parizo)
loĝado en duobla ĉambro, luksa kategorio
vespermanĝo ĉe la alvena tago 21-an de Julio,
tag- kaj vespermanĝo la vendredon 22-an de Julio,
usonaj matenmanĝoj ĉiujn tagojn.
transportoj kaj vizitoj en klimatizitaj aùtobusoj,
ekskursoj en kaj apud la ĉefurbo vendrede 22-an de Julio (palaco, muzeo, ĝardeno, sanktejo, bazaraj stratoj...)
helpo ĉe la flughaveno,
portado de bagaĝoj,
alvena koktelo,
vojaĝsako, gvidlibro pri Koreio.
asista-rehejmiga asekuro,
diversaj impostetoj

Bezonatas simpla pasporto ( plu valida ĝis 2.94)

Ne estas entenataj,

nuliga asekuro (2%)
trinkmono, trinkaĵoj, kaj individuaj elspezoj
flughavena imposto de 7.200 wonoj

Minimumo por tiu karavano : 20 partoprenantoj

Prezo : **13.900 FRF** Frua rezervo(°): **4.920 FRF**

Suplemento por unuopa ĉambro : **3.500 FRF** " **1.200 FRF**

**(La rezervoprezo entenas la nuligan asekuron)**

**DUA PROPONO : (17-taga)**

Ekiro Merkrede 20-an de Julio( 19h30 ĉe Paris Roissy). Alveno en Seulo Jaùde 17h30.

Reveno Vendrede 5-an de Aùgusto (en Roissy 19h10)

Ekde alveno ĝis dimanĉon 31-an de Julio matene loĝado ĉe HOTELO SHERATON WALKER, la kongresejo, kie okazas plej multaj aranĝoj.

Vendrede 22-an de Julio, vizitoj en kaj apud la ĉefurbo (palaco, muzeo, ĝardeno, sanktejo, bazaraj stratoj...)

Sabate 23-an ĝis sabate 30-an inkluzive : vi mem profitas la aranĝojn de la U.K.

Dimanĉon 31-an de Julio :vojaĝo al folklora vilaĝo sude de Seulo, tiea tagmanĝo, daùrigo al Suwon, kaj Mont Sogni, vizito de Templo Popchusa. Vespermanĝo kaj tranokto en Hotelo SOGNISAN






# EK AL SEULO-U.K. 1994 !

Lundon 1-an de Aùgusto :vojaĝo al Haeinsa kaj ĝia 12-centjara templo; daùrigo al Kyongju, loka manĝado, daùrigo al Kyongju, vespermanĝo kaj nokto en HILTON hotelo.

Mardon 2-an de Aùgusto : vizito de Kyongju (antaùa ĉefurbo), mirado al grotoj, budaoj, 8-a jarcenta tombo, tagmanĝo survoje...Vespermanĝo kaj tranokto ĉe sama hotelo HILTON.

Merkredon 3-an de Aùgusto : vizito de la urba bazaro, de la Tumulis-parko kaj ĝia elstara elfosado de riĉaj reĝaĵoj, de astronomia observatorio. Loka tagmanĝo. Vizito de nacia muzeo. Daùrigo ĉe duonluna fortikaĵo Panwolsong, kaj Somerpalaco Anapchi. Reveno kaj vespermanĝo ĉe HILTON.

Jaùdon 4-an de Aùgusto: ekiro al PUSAN. Survoje vizito de templo Tongdosa (jaro 647a), kun ĝiaj 45 konstruaĵoj. En PUSAN, vizito de la fiŝbazaro. Loka tagmanĝo. Daùrigo ĉe Parko Yongdusan, supreniro al Panorama Turo. Vespermanĝo kaj tranokto ĉe Hotelo HYATT.

Vendredon 5-an de Aùgusto : transporto al flughaveno PUSAN kie komenciĝos la flugado ĝis Parizo tra Seulo (unuhora paùzo).

En la prezo entenatas

flugo Parizo/Seulo/Pusan Kimhae/Parizo per regula AIR KOREAN.
loĝado en duobla ĉambro, en unukategoria kaj unuaklasa citaj hoteloj (usonaj matenmanĝoj)
tag- kaj vespermanĝoj la unuan vendredon, kaj ekde dimanĉon 31-an ĉiuj manĝoj
transportoj kaj vizitoj en klimatizitaj aùtobusoj
flughavena helpado, transporto de bagaĝoj
asista-rehejmiga asekuro,
koktelo ĉe alveno,
vojaĝsako, gvidilo pri Koreio,
diversaj impostetoj

Bezonatas simpla pasporto (plu valida ĝis 2.94)

Ne entenatas

nuliga asekuro (2% de la entuta kosto)
trinkmono, trinkaĵoj, kaj individuaj elspezoj
flughavena imposto de 7.200 wonoj

Minimumo por tiu karavano :20 partoprenantoj

prezo : **18.900 FRF** Frua rezervo (°) **F.6.700**

Suplemento por unuopa ĉambro : **5.150 FRF** " **F.1.720**

(°) La rezervo entenas la nuligan asekuron.

***VI POVAS REZERVI ĈE NIA SIDEJO*** PER SUMO INDIKITA fronte al ĉiu prezo. Se estos 32 partoprenantoj por la 12taga karavano, ni rabatos ĉiun unuopan lastan fakturon je **600 FRF** ; se estos 32 partoprenantoj por la 17taga karavano, ni rabatos ĉiun unuopan lastan fakturon je **900 FRF**. Ni fermos la aliĝkajeron la 1-an de majo, se mankas sufiĉe da partoprenantoj, kaj tiam rehavigos al vi ĉiujn rezervosumojn.

Al ĉiu rezervanto, ni sendos iom pli detalan vojaĝkajeron, kaj detalfolion por la ceteraj pagoj. Vi kalkulu, ke la lastan fakturon ni devos enkasigi ĝis la 15-an de junio 1994.

Ni kuraĝis fari al vi tre fruan proponon, por helpi vian preparon. Bone komprenu, ke la akiritaj kondiĉoj, post selekto el inter pluraj agentejaj proponoj, entenas seriozecon, garantiojn, sperton, kaj plej tre decajn prezojn.